



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

Nia Literatura Konkurso

Tial ke ankoraŭ oni ne eljuĝis la ricevitajn laboraĵojn, kiujn sendis al ni la partoprenantoj je la Literatura Konkurso anoncita en la septembra numero de NIA VIVO, ni publikigas nun la jenan, ekterkonkursan traduken de la versaĵo de José de Velilla.

LA GUT' FALINTA

Falis guto sur la maron
El nubeto deveninta;
Ĝi kreskigas ja l'akvaron
De la mar' ne ĝin sentinta.

Post profunda meditado
Hom' konigas gravan veron;
Sed ni, malgraŭ mondskuado,
Eĉ konscias ne l'aferon.

Tamen, kiel venas rondoj
Sur la mar' de l' gut' falinta,
Flugas tra l'homar' vivondoj
De la ver' jus aperinta.

Do, senhalte ŝprucu are;
Ne laciĝu, hela penso,
Levu, kiel gut' ĉemare,
La nivelon de l'hommenso.

Tradukis,
RAMON DE SALAS.

LETERO EL NEDERLANDO

Kara Redakcio:

Pere de mia amiko Petro Kaal mi ricevis la monatan bultenon NIA VIVO eldonatan de via esperanto-societo "Fraterco" kaj tuj min kaptis la ideo skribi al vi kelkajn vortojn, kiujn vi eble dezirus publikigi en vian bultenon.

Ĝin leginte mi image revidis vian belegan landon kun ĝia varmkora popolo, ĝiajn urbojn kun blankaj domoj, ĝiajn montojn, kies pintoj ĉiam klopodas atingi la ĉielon, kun eterne verdaj valoj inter ili; mi aŭdas la voĉojn de niaj ĝentilaj kaj sindonaj gvidantoj, kiuj kondukis nin (eble iomete

trorapide por ni, flegmemaj holandanoj) tra la stratoj de la urbo kaj sur la monto Tibidabo kun ĝia ravega panoramo. Ho, kiel ni ĝuis! Vere, geamikoj, kion mi skribus pri la vojaĝo tra via bela lando, tio certe povus plenigi vian bultenon por tuta jaro, sed mi nun ne deziras detale raporti pri ĝi. Pli volonte mi volas rakonti ion, kio estas laŭ mia opinio iu el plej belaj momentoj el mia vivado.

En via urbo Zaragoza mi havis (ĉu eble ankoraŭ havas?) korespondanton, kiu mem ne povis ĉesti la Valencian Kongreson. Li ebligis al mi renkonti du el liaj amikinoj en Valencio. Jam, kiam ni venis en Valencion, Sro. R. Quílez diris al mi, ke fraŭlino Bueno el Zaragoza petis infermojn pri mi kaj li donis al mi la okazon tuj renkonti ŝin. Sed vere mi ne kuraĝis fari tion. La tutan nokton mi sidis en vagono, mi eĉ ne havis okazon por lavi kaj razi min, do vi komprenas, ke tiam ne estis la taŭga momento por prezenti min al hispana belulino. Feliĉe jam la sekvintan tagon mi renkontis la Zaragozajn fraŭlinojn. Ho, kiel mi antaŭe timis pri la demando, ĉu mi estos sufiĉe kapabla paroli kun ili, sciante, ke ili ambaŭ estas lertaj parolantinoj. Tamen la timo estis neprava. Post kelke da minutoj ni jam interparolis, kvazaŭ ni estus samlandanoj. Nur estis bedaŭrinde, ke la tempo tiom rapide forflugis. Pri kio ni parolis? Mi tute forgesis, sed mi certe scias, ke ni povis paroli pri ĉio, nin reciproke komprenante. Tro baldaŭ venis la tempo, kiam ni devis reveni al niaj hejmoj kaj nur restis la pensoj flugantaj al la belega Hispanlando kaj al ĝia varmkora popolo, sed mi certigas al vi, ke neniu el ni iam forgesos la tagojn travivitajn en via lando.

Mi legis en vian bultenon, ke vi funebras pro la morto de la glora kaj famkonata Dro. Ramón y Cajal. Nun vi ne pli bone povas memori vian amantan mortinton, ol se vi agas laŭ liaj pensoj. Tiam vi certe plenumos lian deziron.

Geamikoj, kunlaboru, por ke baldaŭ venu en la mondon amo kaj paco, fraterco kaj amikeco, pere de nia belega kaj ravega lingvo. Vivu Esperanto!

Kamaradece via
J. SLOTECRAAF.

KONTRAŬ LA MILITO

Je la unua fojo, kiam mi naskiĝis, antaŭ multegaj jaroj, miaj unuaj ploroj estis en Alando.

De tiam mi priokupiĝas pri la fenomeno, ke ĉiuj infanoj ploras, kiam ili naskiĝas. Sendube ili ne venas kontentaj en tiun ĉi mondon. Siajn rezonojn ili certe havas.

Alando havis reĝon tre interesan. Li ofte komunikis kun la dioj kaj, se tiuj ĉi koleriĝis, la reĝo por malkolerigi ilin tranĉis la kapon al tri aŭ kvar el siaj soldatoj, ĝenerale el tiuj, kies kapkovriloj estis tro difektitaj.

Iun matenon la reĝo eliris el sia kaverno kun malbona humoro, ĉar kuloj ne lasis al li dormi.

La reĝo sendis al la reĝo de la najbara lando, Bosujo, delegiton, por ke li sin preparu por militi, ĉar alanda reĝo baldaŭ iros kun sia armeo, por danci sur lia ventro novan kaj artan dancon.

Bosuja reĝo afable aŭskultis la senditon kaj poste manĝis lin.

Post malmulte da tempo alandanoj kaj bosujanoj batis sin reciproke.

Mia tiama vivo finiĝis pro batego, kiun sur mian kapon faligis bosujano per dikega bastono, samtempe ke li diris, ke mi estas lia malamiko. Tamen mi serioze certigas, ke estis tiam la unua fojo, kiam mi vidis tian viron.

De tiam oni komencis la unuajn propagandojn kontraŭ la milito.

Pasis kelkaj jaroj kaj denove oni ordonis al mi ekvivi en tiu ĉi mondo; sed tiun fojon mi komencis mian ploron en Bosujo.

La homaro multe progresis, de kiam mi lasis ĝin. Nune la popolo ne estas sub la kaprico de unu sola homo. Aro de personoj regas la landojn.

La propagando kontraŭ la milito entuziasme daŭris per kortuŝantaj frazoj: La milito kaŭzas la morton! mizeron! larmojn! malfeliĉon de la homaro...! La popolo estis tre klera. Oni publikigis gazetojn, kiujn preskaŭ ĉiuj legis kaj multaj ne komprenis.

Iun tagon mi legis sur alanda gazeto, ke ni, la bosujanoj estas iliaj malamikoj. Tiu sciigo konfuzis min, tial ke mi ne estas malamiko de iu ajn, sed tiom oni diris ĝin per verkoj, paroladoj kaj propagando, ke mi fine venis en la konvinkon, ke efektive alandanoj estas niaj malamikoj.

La afero pli akriĝis. Laŭ la gazetoj la alandanoj submarigis ŝipon nian. Verdire, ĝis tiam mi ne sciis, ke mi havis ŝipon nek eĉ boaton; sed tio certe estis vero, tial ke la gazetoj kaj Registaro ĝin certigis. Mi ja scios plenumi mian patrujan devon. De tiu momento mi penos trovi la alandanojn, kiuj malaperigis mian karan ŝipon kaj mi puncs lian abomenindan agon. Miaj penoj estis grande simpligataj, ĉar oni konvikis min, pri tio ke ne estas necese trovi la aŭtorojn de la submariĝo, sed ĉiuj, kiuj estas alandanoj, devas esti eks-termitaj.

Iun nokton, kiam mi estis preskaŭ glaciĝinta gardstarante, oni aŭdis grandan pafon sekvatan de stranga siblo kaj... paf !!!, mia korpo dispecigita malaperas en la aeron: miaj kruroj flugis norden, mia kapo, suden k. t. p., mia poŝhorloĝo iris kontraŭ la nazon de la estro de mia regimento, kiu prenis kaj rigardis ĝin kaj funebre diris: Estas la horo de la morto.

Mia animo iris supren, de kie mi vidis kelkajn sinjorojn, kiuj en tre luksa hejmo gaje fumis kaj trinkis ĉampanvinon. Iu el la ĉeestantoj toastis por la progreso kaj riĉiĝo de niaj fabrikoj, kiuj jam ne havos la konkuron de venkita Alando.

La propagando kontraŭ la milito rekomenciĝis. Tiucele oni starigis Internacian Konsilantaron Iun tagon la reprezentantoj de Alando prezentis proteston kontraŭ Bosujo. La internacia Juĝantaro multe pridiskutis la kaŭzojn kaj, atentante pri tio ke Alando preskaŭ ne havis armeon, decidis, ke Alando pagu tri mil kilogramojn da pasto por purigi la dentojn al Bosujo, kvazaŭ punon pro ne-prava protesto. Alando ne volis respekti tiun decidon kaj foriris el la internacia societo. Same faris Bosujo, tial ke ĝi volis dek mil kilogramojn.

La propagando paca varmege estis farita. La porpacistoj publikigis flaman instigon, dirante, ke se milito ekokazos ili eksplodigos sangan revolucion.

Mia spirito flugis ĉe la registarojn petante permeson por propagandi al ili kontraŭ milito.

—Mi ne volas aŭdi idiotajojn—oni respondis al mi.

—Nur malmultajn vortojn—mi insistis—. Nur du minutojn. Mi avertas vin, ke la malamiko havas grandiozan elpensadon. Per malgranda ilo en unu sekundo malaperigos milionojn da homoj... bruligos viajn fabrikojn,... mortigos vin kaj viajn familiojn...

Mi foriris kontentega, tial ke mi evitis la tujan militon.

Trans pordon mi aŭdis ploron de infano ĵus alveninta en la mondon. Kial la infanoj ploras, kiam venas en tiun ĉi mondon?

JOSE OROS.

ANTAŬ VIRINA PORTRETO

Ankoraŭ ne kombinte mian hararon kaj estante korpe duonnuda, mi ekkriis.:

Bonan tagon, belega fotografaĵo!

Pli bone dirite: Bonan tagon, kara amikino! Ĉar vi ja estas mia bona amikino.

Ĝoje mi vidas, ke malgraŭ la mallumo reginta en mia ĉambro dum la tuta nokto viaj ruĝaj kaj belformaj lipoj ne perdis sian eternan, allogan rideton. Jes, vere vi aspektas bele en ĉi tiu bildo, sed ne tiom multe, kiom reale. Mi kredas, ke la fotografo malsukcesis farante vian portreton, kvankam mi ja scias, ke kopii perfekte vian belecon estas tasko nur realigebla de diaj manoj...

Amikinjo, via rideto estas tiel malfacila por kopii, kiel tiu de "Gioconda". Vi ridetas tiel milde... Sed, se vi vidus, kiel blua aperis hodiaŭ la ĉielo, vi ja ridetus pli volonte, ol en la fotografaĵo.

Ĉu vi ne scias, ke hodiaŭ mi ekskursos? Jes, hodiaŭ mi naĝos en la kvietaj, vivigaj akvoj de la rivero, dolĉe kisataj de la oraj sunradioj...

Post kelkaj minutoj miaj geamikoj venos ĉi tien por alvoki min. Baldaŭ mi foriros. Sed antaŭe mi volas al vi prezenti tiun portreton, kiu estas fronte al vi.

Interesan kapon ĝi montras, ĉu ne?

Tiu hararo frizita kaj longa, tiuj okuloj rigardantaj melankolie, liaj eta liphararo kaj mallon-

ga barbo apartenas al poeto Gustavo Adolfo Bécquer, kaj la portreto estis pentrata de lia frato Valeriano.

Ĉu vi ne legis la tiom multe belegajn legendojn verkitaĵojn de Bécquer pri la arta kaj silentema Toledo?

Legendoj naskiĝintaj en Toledo, ĉar ili estis la suferoj kaj sopiroj de la poeto; kaj li ĉiam, kiam suferis pro spirita malsano iris tuj en la antikvan urbon, tial ke ĝi posedis la strangan, sed nepre certan kapablon revivigi la koron de Gustavo Adolfo.

Mi pensas, ke la estonteco devas ligi por ĉiam, eterne, la historiplenajn Toledojn al la nomo de ĝia plej mirinda kantanto (aŭ laŭdanto).

Tion meritas, kiu havis la belan ideon lokigi sur muro de ĉi el plej tipaj stratoj de la urbo avizon jene diranta: "Je la nomo de la poetoj kaj de la artistoj, je la nomo de tiuj, kiuj revas kaj studas, oni malpermesas al la civilizacio tuŝi per sia mano malrespektema kaj vulgara eĉ unu el ĉi tiuj brikoj".

Mi imagas lin maldiligente promenanta laŭ la jarcentaj stratoj de Toledo, laŭ tiuj stratoj mallarĝaj kaj mutaj, nur elokventaj por li, kiuj liveris la ripozon kaj trankvilon bezonatajn de lia animo morte vundita per la malvera amo de bela virino.

Mi imagas lin bruliganta la leterojn senditajn al li de Elisa; rigardanta, kiel la flamo malaperigas sarkasme la amatajn leterojn, kiujn li ĉiam gardis, kiel se ili estus valoregaj trezoroj.

Ŝajnas al li, ke la flamo estas la mano de Elisa; flava, senviva mano, kiu mokas lin farante treme nekomprenblajn signojn.

Li kaŝas sian vizaĝon per siaj manoj. Image Gustavo vidas la ĉarman virinon inspirintan multajn el liaj verkoj, la virinon plej amatan, plej adoratan, kiu ne sciis kompreni la sinceran amon de sincera koro.

Denove li rigardas la tremantan flamon, "ŝian manon"... Kaj li pensas, ke tiu mano eble estas en tiu ĉi momento karesata de aliaj manoj apartenantaj al amanto pli bonsorta, ol li.

Eble estas tiam, kiam Gustavo ekkrias, dum liaj lipoj mienas malgaje aŭ malŝateme pro amareco: "Mi volas pensi nenion, senti nenion..."

Ĉu estis ĉi tiu la lasta amsufero de la melankoliema poeto? Ne. De la balkono de sia hejmo Gustavo vidadas anĝelan virinon. Silente li admiras ŝiajn revigajn okulojn. Li ne akceptas esti prezentata al ŝi. Post kelkaj jaroj, kiam ŝi jam estas edziniĝinta, hazarde ili interparolas. Malfrua, vana renkontiĝo. Kaj, kompreneble, la unua konversacio estis ankaŭ la lasta.

Tiel silente, kiel li amis, lia koro suferis pro rompita revo. Amante en silento, Gustavo Adolfo Bécquer persekutis nebulan amon, amon, kiu...

Ĉu vi aŭdis, kara amikino? Miaj amikoj jam estas ĉi tie. Jes, mi aŭdas, kiel ili frapas la pordon. Mi foriras. Pardonu min, se mia parolado estis por vi tro peza. Se ne, kiam mi estos reveninta hejmen, kaj, dum vi ridetas konstante, mi parolos al vi... Pri kio? Pri negravaĵoj, certe... sed mi parolos al vi. Adiaŭ mia kara!

JOSE GASCON CARRETER.

MI VIDIS FLORANTAN VIRON

Kvankam mi ne estas maljuna, en mia tuta vivo mi jam vidis ofte plori; tio ĉiam min malgajigis, sed laŭ mia kompreno ne ĉiam nek ĉiuj larmoj estas indaj, je tio ke ni pri ili atentu.

Mi vidis sinjorinon ploranta, ĉar ŝia birdeto aŭ kateto ne volis manĝi. Tiu sinjorino estis tute ĉagrenita kaj ŝiaj larmoj estis vere sinceraj kaj dikaj, tiel dikaj, ke oni povus per ili surverŝi belajn ĝardenojn. Sed, ĉu tiuj ĉi larmoj ne estas sufiĉe ridindaj?

Ian tagon mi vidis fraŭlinon, kiu per siaj larmoj tre bone povus lavi sian veston. Ŝi ploregis, ŝia vizaĝo estis terure pala, same, kiel dolorplena Virgulino. Mi demandis: Kial vi ploras?

"Mia fianĉo, kiun mi multe amas, forgesis min kaj li nuntempe amas alian fraŭlinon".

Terura afero ĝi estas; sed laŭ tio, kion mi vidas, li ne meritas vian amon; forgesu lin!

"Mi ne povas, nur al mi restas, plori dum mia tuta vivo; kaj ŝi ploris, tiom multe ploris, ke mi ankaŭ ploris ĵomete.

Promenante tra silenta arbaro, mi vidis sidanta sur benko kaj kun sia vizaĝo sur siajn manojn, plorantan viron.

Mi neniam estis vidinta plorantan viron kaj eĉ mi ĉiam opiniis, ke viro neniam kaj nenial devas plori; tial mi tute deziris scii, kial tiu viro ploras.

Li vere estis malfeliĉa homo, ĉar liaj edzino kaj filinoj elspezis lian tutan monon pro luksa troemo kaj, tial ke li jam estis maljuna kaj ne povis enspezi monon per sia laboro, lia familio, kiun li multe ĉiam amis, lin forpelis el sia hejmo kaj tien, en silentan arbaron, li iris por plori sian ĉagrenon.

Ho! Viro ankaŭ rajtas plori: liaj larmoj estas tute honorindaj; mi ankaŭ ploregis.

VERDSTELULINO.

NOVAĴOJ EL VALENCIA REGIONO

Niaj valenciaj amikoj ja sukcesas pri la propagando je nia kara lingvo en sia regiono: Nun ekzistas en Valencio (urbo) kvar gravaj esperanto-grupoj; nome: la antikva Grupo Esperantista Valencio; Grupo Laborista Esperantista kun la Esperantista Orkestreto; la grupo fondita de la germana samideano Dro. Karolo W. Brehem kun klarigado je kurso en "Academia Cots de Estudios Generales" kaj la freŝfondita grupo "Verda Stelo" ĉe la apudmaraj kvartaloj, jam konsistanta el pli, ol sepdek entuziasmaj societanoj.

Plie Grupo Esperantista Valencio klarigas du kursojn, tiu Laborista, du, Verda Stelo unu kaj estas alia kroma en Popola Universitato, partoprenata de pli, ol cent studentoj.

La 16-an de Decembro la Valencioj gesamideoj ekskursis en *Chesten* kie estis gaja kunmanĝo, dancado, paroladoj, ludoj kaj ĉiuspecaj amuziĝoj por solenigi la naskiĝan datrevenon de Dro. Zamenhof. Ĉestis Sroj. Piñó kun siaj du filinoj: Albiol, partopreninto je la Stokolma Kongreso; Salom Fornals, profesoro de Grupo Valencio; lia kuzo Bosch, antikva kaj lerta esperantisto; Finoj. Torres, el kiuj tiu plej aĝa atingis superan taksateston en la Universitato okaze de ekzameno je Esperanto; Gesinjoroj Boscá, kiuj partoprenis la Ko-

lonjan Kongreson la antaŭpasintan jaron; nova entuziasma esperantisto, kiu kunportis tre belan standardon Valencia-esperantan; Sro. Palomares, el Laborista Grupo; la prezidanto de Verda Stelo; la komitato de la grupo de *Chiva*; angla, geedza paro, antikvaj esperantistoj dumvintre loĝantaj en Valencio, kaj multaj aliaj.

Nia tre varma gratulo al la tieaj, aĝemaj sa mideoj, kies konstanta sukceso taŭgu, ni deziras, kiel instigilo por ĉiuj hipanaj esperantistoj.

SPRITAĴOJ

Inter studentoj:

—Mi decidis studi tiom multe, ke mi nun studas dudek ses horojn ĉiutage.

—Kiom mensogema vi estas! Kiel tio povas okazi, se tuta tago nur havas dudek kvar horojn?

—Nu! ĉu vi ne konsideras min kapabla ellitiĝi por studi du horojn antaŭ la tagkomenciĝo?

* * *

En lernejo:

—Kiu estis la unua viro?

—Adamo.

—Tre bone; kaj kiu lia edzino?

—Evo.

—Ĝuste; do, se Adamo estis la unua viro kaj Evo la unua virino, ĉu Adamo havis bopatrinojn?

—Jes, sinjoro.

—Strange! Kiu estis la bopatrino de Adamo?

—La serpento.

* * *

Profesoro—Nun vi jam scias, kio estas ŝafo kaj por kio ĝia lano utilas. Diru do al mi, Joĉjo: el kiu ŝtofo estas farita via pantalono?

Joĉjo—El malnova pantalono de mia patro.

* * *

Profesoro—La lernanto devas esti, kvazaŭ elektra sonorilo; oni premas ĝian butonon kaj tuj ĝi sonorvibras. Oni demandas lernanton kaj li devas senprokraste respondi.

Lernanto—Nu, sinjoro profesoro, kion fari se elektrofluo mankas?

* * *

—Sinjoro, via filo ĉiam donas al mi unupesetan trinkmonon.

—Ho! mia filo havas tre riĉan patron kaj mi tute ne.

* * *

—Kio estas Siberio?

—Grandega lando ĉe la nordo de Azio.

—Kio speciala okazas en ĝi?

—Ke tie neĝas en ĉiuj sezonoj.

—Kiu estas ĝiaj ĉefaj produktaĵoj?

Peĉjo dubas kaj poste pro subita inspiro li diras:

—La graciaĵoj!

* * *

—Ĉu vi scias, ke hieraŭ aŭtomobilo mortigis mian samprofesiulo Rodriguez?

—Jen vera bonsortulo! Antaŭ kvar tagoj li asekuris sian vivon.

* * *

Patro—Gefiletoj, estas ĉiam necese ne prokrasti ĝis morgaŭ, kion oni povas fari nun.

La gefiloj.—Do, paĉjo, donu al ni la restantajn biskvitojn, kiujn vi lasis por morgaŭ.

ANEKDOTO

AUBER KAJ LA PATRINO

Jen estas piketa spritaĵo de la granda franca muzikverkisto *Auber*, al kiu ni ŝuldas tiom da ĉefverkoj, inter kiuj estas ekzemple, *La Mutulino*, *La nigra domeno*, k. c.

Patrino akompanata de sia filino foje vizitis la famulon kaj post reciprokaj salutoj ŝi diris al li:

—Kara Majstro, diru al mi senflute, senpartie, kion vi pensas pri la voĉo de mia filino.

La muzikverkisto ludis sur la piano kelkajn muzikpecojn, kiujn la fraŭlino provekantis.

Post tiu detala esploro de la kantvoĉo, *Auber* malflame diris al la patrino.

—Via filino havas belan voĉon, sed, se mi estus en via loko, mi donigus al ŝi lecionojn pri akvarelo!

Verkis,
G. PHILIPPETE.

EDZINIĜO

Nia fervora kunsocietano Fino. Josefino Carlús edziniĝis la 23-an de la ĵus pasinta januaro kun Sro. Manuel Pérez.

Ni gratulas tutkore nian karan Fratecaninon kaj deziras al ŝi ĉiuspecajn feliĉaĵojn en ŝia nova stato.

MORTO

La pasintan monaton januaro post longa malsano mortis la patro de nia kara kunsocietano sinjoro Petro Marqueta.

NIA VIVO je la nomo de "Frateco" esprimas al li sian sinceran kondolencon pro lia tiom neriparebla kaj doloriga perdo.

PENSOJ

Malspritulo ĉiam trovas pli malspritan viron, kilt lin admiras.

(*Boileau*).

Lukso estas nur malriĉeco de altranguloj.

(*La sama*).

Kiam la konstitucio de ŝtato estas enigmo, ĝia estonto estas problemo.

Bonald (Vicgrafo).

Fari la bonon al malnoblulo estas ĵeti akvon en la maron.

(*El Kihoto*).

Neniam la bono estis multa.

(*El Kihoto*).